

# Nova provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia  
Numero 7 Julio 1994

*Malgraŭ la evidenta modesteco de la unuaj anoncetoj pri Novo antaŭ tri jaroj, iuj supozis iom pli grandan skalon ĉe la projekto ol ekzistis efektive. Ankoraŭ venas informpetoj de homoj kun similaj aŭ eĉ pli grandiozaj atendoj. Sed la vero estas nun ĝenerale klara: Novo estas, ĝis nun, esence afero de ties iniciatinto, do de ununura homo.*

*Tio, kaj la misoj kaj mankoj de tiu homo, klarigas iujn el la neatingoj de la asocio: la maloftecon de ties organo, la daŭran dubon pri kotizoj, la malsukceson alveni al iuj el la dezirataj interkonsentoj, por mencii iujn elstarajn. Estas ironie, ke precize la sama plago kiu afliktis ĉiun alian provon reformi Esperanton — reformista individueco — same afliktas projekton kun baza pretendo je komuneco. Tamen tiel ja estis kaj restas . . . ĝis tiu ĉi nuno. Kaj tiu ĉi nuno estas kredeble la plej decidiga momento en la historio de la afero. Estas, fakte, la momento de la vera nasko. La nova naskiĝinto nun frontas la devon pluvivi en la ekstera mondo — ĉu ĝi travivos, aŭ ne?*

*Tio kompreneble dependas de pluraj faktoroj. Por taksu la ŝancojn ĝuste, indas rimarki ke la respondo ne dependas de la ekzisto aŭ neekzisto de financaj rimedoj, kiel oni povus supozu. Tiaj ja ekzistas, sen la plej eta dubo. Kvankam aktuale ne kuŝas multe da mono en la konto de Novo, tamen lastatempe kelkaj novistoj estas sendepende kaj seninstige indikintaj sian pretecon provizi financon subtenon por plua agado. Kaj ekzistas neniu kialo supozu ke tiuj subtenemuloj estas unikaj.*

*Nek mankas, en tiu ĉi signifa momento, individuo kiu pretas alpreni al si la guidan rolon. Sed indas emfazi, ke la aktuale rezultanta situacio, en kiu nova guidanto simple anstataŭas la antaŭan, devas esti rigardata kiel **absolute nur provizora**. Estas ne nur, ke s-ro Günkel eble laciĝos se la tuta ŝarĝo restos sur li; estas ankaŭ kontraŭ la tuta koncepto de Novo, ke la projekto restu esence en la manoj de unu homo. Pro kaj praktikaj kaj principaj kialoj, necesas progresanta disdividado de la asociaj taskoj. Ĉu plaĉas al ni la detaloj aŭ ne, ni devas — ja komune — ellabori statuton, fiksi kotizojn, decidi pri nepagipovantoj, aranĝi voĉdonojn, fari simprezenton al movadaj kaj eksteraj instancoj, kaj tiel plu. Tre feliĉe, s-ro Günkel malemas lasi tiajn aferojn al traktado de dumkongresaj kunsidoj (kiel faras UEA kaj ties kutimaj fakasocioj), kaj tio donas la eblon je konstanta kunlaboro de speco apenaŭ konata al aliaj esperantistaj organizaĵoj.*

*Ni do profitu tiun eblon. Ni ĉiuj komencu skribante al la nova guidanto por registri nian daŭran intereson (Claus Günkel, Killianstr. 18, DE-33098 Paderborn, Germanio), kunsendante laŭpovan kotizon por certigi al li ke liaj penoj ne venigos al li financon perdon. Samtempe, aŭ poste, ni sendu al li senĉesan sinsekvon de kontribuoj ĉiuspecaj. Per aktiva kaj entuziasma kunagado, ni faru el Novo tion kio ĝi ĉiam devus esti: ne afero de unu homo, sed entrepreno plene komuna.*

ROY MCCOY

## Ortografio

Do (laŭ la dua voĉdono) ni ne ege povas progresigi nian ortografion! Ne mankas ideoj; ja ili abundas, eĉ abundaĉas! Sed kiu elserĉas preter la sia lingvo? Kie troviĝas la argumentoj kaj la statistika subteno pro tramonda uzado anstataŭ nur la sia prefero? Kiel ni progresu el la marĉo de “mi” kaj “vi” ĝis tiu tereno deziregata de “ni”? Eble jene:

Pat (mia kunulino) kaj mi verkas vort-frekvencaron de Esperanto. Ni celas 100000 vortojn de novelaĵo, tamen ariĝis ĝis nun, el la angla kaj ĉina antologioj, nur 37000 vortoj (detalojn, kaj datenojn, kiam temos). Tamen, kvankam estas nur 37000 vortoj, estas 100503 literoj (malinkluzive majusklojn), kaj tio estas specimeno sufiĉe granda. Jen niaj 100503 literdatenoj:

a 12465	o 6336	m 3172	ĉ 832	z 323
i 12309	r 4874	d 3055	f 803	c 313
e 8716	k 4427	h 2516	ŭ 758	ĵ 48
l 7448	t 4360	p 2496	b 635	ĥ 8
n 7370	j 3356	v 2052	g 555	
s 6615	u 3277	ŝ 840	ĝ 544	

Ŝajne ni ĉiuj, kaj sendube ankaŭ multegaj homoj ekster la grupo kiuj uzas tekstprilaborilojn, modemojn aŭ komputilojn aliacele, deziras senigi la neceson uzi la malfacilaĵon (eĉ neebulon!) de la literoj ĉapelitaj, preferante uzi anstataŭe la preterajn literojn *q, w, x, y*, kune kun du kunmetaĵojn. Sin oferas iacele du rimedoj: aŭ la fonemoj kiuj estas la malplej uzataj, t.e. *ĵ* kaj *ĥ* (vidu supre) estu tiuj kiuj estos kunmetaĵoj, aŭ alie ni elektu tiel, ke rezultos sistemo kiu estas laŭeble la plej racia laŭ nia fonemaro. Ni konsideru, sed unue, ek al la voĉdono:

Laŭ nia dua voĉdono ni plejege interjesas, ke restas senŝanĝaj la literoj: *a, b, d, e, f, g, h, i, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, v, z*, kio sumiĝas ĝis iom pli ol 93% el ia ajn skribaĵo. Ni decidu, do, *neniam denove* malŝpari spacon por tiujn literojn tede listigi, krom individuope se iu proponos argumenton (ne nur preferon) iun aŭ iujn ŝanĝi. Ni diskutu estonte nur la alian 6.7%, t.e. *c, ĉ, ĝ, ĥ, j, ĵ, ŝ, ŭ*. El tiuj, *ĥ, j, ĵ, ŝ, ŭ* estas unuopaj sonoj, kaj diftongoj estas *c, ĉ, ĝ*.

La anstataŭigo de la litero *j* per la signo *y* gajnis 15 jesojn sed 5 neojn, kaj la konkura anstataŭigo de la litero *ĵ* per la signo *j* gajnis 12 jesojn sed 8 neojn. *Tiuj estas ĝis nun niaj solaj voĉdonplejmultoj por ŝanĝoj.*

Ĉu tiuj du rezultoj estas akcepteblaj laŭ tiuj kiuj proponis kontraŭan voĉdonon? Espereble jes. Mi mem donis voĉon kontraŭ la duan (propono 91). Mi opiniis ke, ĉar *ĵ* estas malpli ol 0.05% el ia ajn skribaĵo (vidu supre), ĝi nepre estu unu el la du kunmetaĵoj, kaj ni ŝparu la signon *j* por pli frekvenca fonemo. Sed mi volonte ŝanĝus mian voĉdonon (do la 12 jesoĵ kaj 8 neoj estus 13 jesoĵ kaj 7 neoj). Ankaŭ, kiel rimarkis Rik Dalton, tiun ŝanĝon deziris Zamenhof mem. Plue, la lingvo estas kiel eble racia, do estu same racia ĝia ortografio; la unuopa sono *ĵ* estu la unuopa litero *j*. Espereble la argumento (ne niaj diversaj preferoj) konvinku; se jes, tiu 6.7% da laborendo duoniĝos ĝis iomete malpli ol 3%.

Estas sekvo: la fonemo *ĝ* estas diftongo de la du sonoj kaj fonemoj *d* kaj *ĵ* (nun *d + j*), do ne necesas elekti; la racio jam faris por ni tiun elekton! La kunmetaĵo *dj* estu la fonemo *ĝ* (kiel alie oni prononcus tiun kunmetaĵon?). Denove mi ŝanĝus la mian voĉdonon de *j* ĝis *dj*. Ĉu ĝenus la ekhavo de tiu kunmetaĵo? Ni konsideru: iom da kunmetado (precize du kunmetaĵoj) nepre necesas, la frekvenco de tiu ĉi fonemo estas nur 0.5%, kaj la elekto estus tute nerefutebla racia! Ĉu ni do ĉiuj permesu al *dj* elŝovi la ĉapelitan signon *ĝ*?

Pli malfacile, ni konsideru la fonemon *ŝ*. Ne estas klara prefero inter *sh* kaj *x*, tamen malaperis *s* kaj *w*, kaj feliĉe ne estas aliaj sugestoj. Kiel helpos nin la tramonda kutimado esprimi la sonon *ŝ*? Ŝajne, ne multe! Por *x*, instigus nin portugala kaj ĉina. Por *sh*, instigus nin angla kaj, denove, ĉina! (La ĉinaj sonoj ne estas ĝuste samaj; ili estas apartaj fonemoj.) Do, kiel? Ĉu estus inteligente elekti duoblan fingrofrapon dum kuŝas netuŝita bone uzinda litero? Plue, la fonemo estas pura, unuopa sono; ĝi ne estas diftongo, kaj neniel ĝi estas fonetike *s + h*! Ĉu pura, unuopa sono ne meritas unuopan signon? Sekvus denove konsekvenco: la litero *ĉ* estas diftongo de *t + s*. Do jam elektita por la diftongo *ĉ* estus la kunmetaĵo *tx*, kaj jen, alia ĉapelita litero forfandos! Eljetenda? Ne necesas: uzu ĝin kiu volas; ĝi restus nur troaĵo!

Ankaŭ iom malfacile, ŝajne, ni konsideru la literon *ŭ*. La signo *u* gajnis 9 jesojn sed 11 neojn, dum la signo *w* gajnis 7 jesojn sed 10 neojn — preskaŭ egale! Ĉu, tamen, estas vere elekto? Se sistemo de ortografio estu sin-konforma, sinproponas nur du elektoj por skribi

vokaldiftongon. Aŭ ni decidus, ke ni prononcu sinsekvajn vokalojn klare kaj aparte, uzante por la diftongoj specialajn signojn (kiel ekzemple *ĵ* kaj *ŝ*), aŭ ni decidus, kontraŭe, ke ni prononcu sinsekvajn vokalojn glate kiel diftongojn kaj uzi specialan signon se ni intencas apartan prononcadon, ekzemple: *a:ero, blu:a, ne:i, ne:utila, ne:uzinda?* (Certe la mia elekto ne estus por iu ajn nelitera signo mezvorte!) Ne povus la du sistemoj sendubsignife kunloĝi. Esperanto jam elektis (per *ŝ*) la unuan. Ĉu la konsekvencoj de tia ĉi elekto ne estis sufiĉe klaraj? Ni proponu tiun ĉi elekton denove, aŭ diskutu plu la konsekvencojn!

Restas iuj temoj diskutendaj, unue la litero *c*. Senŝanĝo gajnis 10 jesojn, tamen ankaŭ 7 neojn, kaj neniam alia elekto gajnis eĉ ĉi tiom. Jen, do, argumento: tiu ĉi fonemo estas diftongo, precize *t + s*, kaj ĝi frekvenco nur 0.3%. Ĉu vere iu ajn bezonus ne malpli ol du rimedojn por literumi tiel malfrekvencan fonemon?! Plej racie, ĉu ne, estus uzi por ĉi tia diftongo ĝian kunmetaĵon *ts*, kaj ŝpari la signon *c* por alia celo pli taŭga?

Kaj nun, kiel pri *ĥ*? Restas *c* kaj *q*. La frekvenco de *ĥ* estas nur 0.008%; vere ĝi apenaŭ ankoraŭ eĉ ekzistas! Kaj mirinde, restas por ĝi elekto inter du literoj ĝis nun neuzitaj! Ĉu tiel malfrekvenca fonemo (malfrekvenca ankaŭ tra la lingvoj de la mondo) meritas la sian literosignon? Nuntempe, neeviteble, jes. Ankoraŭ ni havas ĝin kaj, neniel diftongo, ĝi estas pura unuopa sono! Ni elektu, do, provizore, la literon *c*.

Ni paŭzu momente . . . Ĉu la signoj *aŭ, aj, oj* estas kunmetaĵoj? Kaj se jes, ĉu ni plendas? Ĉu same estas la signoj *tx, dj, ts* kunmetaĵoj? Kaj se jes, ĉu ne plendas? Tiuj fonemoj, ĉu vokaloj, ĉu konsonoj, ne estas puraj unuopaj sonoj. Ili estas same glataĵoj, rapidaj ĉe la konsonoj, pli malrapidaj ĉe la vokaloj, sed esence samaj, egale raciaj. Kial, do, plendi pri la dua se ne pri la unua?

Sed ĉi tiel ni trafis eĉ krome: ni atingis duope, kiel la puraj sonoj atingis unuope, la Principon de "Unu litero por unu sono kaj unu sono por unu litero" tra la tuta alfabeto kaj la tuta fonemaro, kion, ni konfesu, neniam atingis la alfabeto kiu enhavis la literojn *c, ĉ* kaj *ĝ*!

Ni atingus, do, alfabeton sen literoj ĉapelitaj, ĝuste kaj racie fonetikan kaj, mirinde, restas ankoraŭ neuzita la litero *q*!

Jen sugesto: niaj nazalaj konsonoj sinnombbras po kvar, sed niaj nazalaj signoj sinnombbras nur

du, nome *m* kaj *n*, tamen estas palatala nazalo en la morfemoj *sinjor* kaj *njo* (la hispana *ñ*) kaj velara nazalo en multoj el niaj morfemoj kiel, ekzemple, *ung, ring, orangutang* (la fonetika simbolo *ŋ*). Ĝis nun tio ŝajne ne estis problemo (sed, ni konstata, la kreinto de *orangutango* fonetike eraris). Ne estus problemo indiki la sonon *ñ*; sufiĉus la signon *nj*. Sed kiel oni indikus la sonon *ŋ*? Ne eblas uzi la signon *ng*; tiu ne indikus la sonon *ŋ*, sed la du sonojn *ng*. Tute ne eblas en Esperanto literumi la puran sonon *ŋ* (nek la nazaligon de vokalo). Ĉu gravas? Ĝis nun, ŝajne ne. Tamen, ni konstata: La sono *ŋ* (sen *g*), aŭ nazaligo de vokaloj, aŭ la ambaŭ, estas fonema en nemalmultaj el la plej uzataj lingvoj de la mondo: ĉina, angla, hinda, bengala, tamila kaj la aliaj lingvoj hindaj kaj dravidaj tra Bharatio, malaja-indoneza, germana, portugala, franca . . . Rigardante al la estonta tutmondecigo de Esperanto, mi sugestas: la signo *q*, uzenda nur kie ne sekvus la sonoj aŭ literoj *k* aŭ *g* (kie sufiĉus *n*) indiku la sonon *ŋ*, kion tamen, oni laŭ elekto prononcadu aŭ kiel *ŋ* aŭ kiel nazaligo de la vokalo (la du iom kunfandiĝas en, ekz., hinda kaj malaja). Do la fuŝaĵo de *orangutango* iĝus la ĝusta *oraqutano* aŭ *oraghutano*, kaj tiun lastan elekton (la *h*-sono estas malpeza) faru malajo aŭ indonezo!

Tony Kelly

### Por Werdin, kontraŭ eŭropeco

Esence kaj pleje min altiras la opinio kaj artikolo de Joachim Werdin en NP 4 (p. 35-36). Ĝuste en ĉina gazeto mi legis du artikolojn kiuj plendis kontraŭ la malfacileco de Esperanto. La ĉinaj artikol-verkistoj ne emas la participojn kaj neologismojn kiel *kurta, lanta, mava* ktp, kaj ili kritikis la Eŭropecon de Esperanto. Kontraŭe, ni Novo-anoj proponas miraklajn solvojn surbaze de Eŭropaj argumentoj. Tiel ni eble altiros esperantistojn regantajn iun Eŭropdevenan lingvon, sed samtempe ni forpuŝos Afrikanojn kaj Azianojn.

Jen miaj proponoj por nia lingvoreformo Eŭropeca.

- *balde, morge* anstataŭ *baldaŭ, morgaŭ*
- prefiksoj *pre-* por tempa antaŭeco kaj *post* por tempa malantaŭeco; *antaŭ* kaj *malantaŭ* havu nur lokan signifon
- pronomoj personaj:  
*li, ili* viro kaj/aŭ virino (sing. kaj plur.)  
*hi, ihi* viro (sing. kaj plur.)

*ŝi, iŝi* virino (sing. kaj plur.)

*ĝi, iĝi* objekto (sing. kaj plur.)

- sufikso *iĉ* por viroj, kiel ekzistas *in* por virinoj.

Tiel:

*patro* = viro aŭ virino

*patroj* = viroj kaj/aŭ virinoj sendistinge

*patriĉo* = vira patro

*patrino* = virina patro

*gepatroj* = nepre ambaŭ seksoj

- utiligi aldonajn vokalojn:

germane	ö	ü	ä
france	eu	u	ai
hungare	ö, ő	ü, ű	–
dane	ø	y	a
finne	–	y	e
estone	õ	–	–
afrikanse	ui	u	y
nederlande	eu	u	–
turke	ö	ü	–

Ankaŭ koreoj kaj ĉinoj tiujn sonojn prononcas.

- anstataŭigi la literon *i* per *j* en la tabelvortoj:

*kiam* → *kjam*

*neniu* → *nenju*

Tiel estus unu silabo malpli prononcenda.

- *alia* kaj *kelka* eniras la tabelvortojn:

*aljam, kelkjun*

Same kiel Joachim Werdin, mi proponas analizi unue ĉiujn mondajn lingvojn kaj alfabetojn por elekti kaj proponi mondan alternativon, ekvilibran kaj mezan vojon: kiujn sonojn prononcas la plimulto homara, kaj kiujn literojn por tiuj sonoj uzi.

**Bert Schumann (Germanio)**

#### NOVAJ MEMBROJ

Abdelmegid Mohamed Mohamed Ahmed,  
Adel Refai st., Mohamed Torki's House,  
El-Mahalla El-Kobra 31951, Egiptio

Marek Bamperski, Euta Stara 120, 42-340  
Pinczyce, Pollando

Janus Di Censo, Via Lampugnano 156,  
20454 Milano, Italio

Pierre Estève, 20, rue Paul Langevin, 64000  
Pau, Francio

#### ADRES-ŜANĜO

Claus Günkel, Killianstr. 18, DE-33098  
Paderborn, Germanio

## Reformu, sed ne detruu

Kiel ĉe la hispana kaj aliaj lingvoj, oni ĉiam reformis kaj reformas. Tamen kiam oni legas aŭ parolas en la prahispana aŭ pralingvoj, ĉiam ĉiuj komprenas aŭ rekonas la lingvon. En Esperanto devus esti simile. La vastan kulturon en Esperanto jam kreitan de longe oni ne devas forlasi aŭ forigi de ni kiam oni reformas.

La reformoj de Esperanto devus esti pli facilaj, pli agrablaj, pli fonetikaj ol la antaŭa Esperanto. Ĉiuj devas rekoni Esperanton en iu ajn skribaĵo, verkaĵo aŭ konversacio. Esperanto devus esti tre rekonebla ne nur por personoj kiuj konas eŭropajn lingvojn sed ankaŭ por personoj kiuj konas aziajn kaj afrikajn lingvojn. Tio ĉi estas mia persona deziro kaj opinio.

Mi instruis iomete Esperanton en Kubo kaj mi rekonas ke la gelernantoj ne povas diri multajn aferojn aŭ esperantajn frazojn post tri, ses aŭ dek lecionoj. Ili mem diras ke Esperanto ne estas tre facila, kiel diras aŭ disvastigas la jamaj geesperantistoj. Ni devas solvi la problemon kun efikaj metodoj kaj kun la reformoj. Estas tre grave por la gelernantoj kaj la gelernantoj.

Persone mi opinias ke la bazoj de la reformoj devas esti la nuna Esperanto, la nunaj avantaĝoj de Esperanto. Mi ankaŭ dezirus forigi komplete la akuzativon de Esperanto, escepte kun la personaj pronomoj, kiujn oni devas lasi kiel jam en Esperanto (*mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, ili*). Oni ne devas uzi tro la adverbojn en Esperanto, sed oni ne devas forigi ilin de kelkaj frazoj. Mi trovas ilin tre utilaj.

Multe plaĉas al mi forigi la finaĵon *-as* en la verboj kaj lasi la aliajn. Esperanto devas esti tre klara, tre specifa kaj ankaŭ tre logika por ni kaj por la novaj geesperantistoj.

Ĉiu reformemulo havas siajn proprajn ideojn. Jam mi rimarkis ke se oni havas multan monon kaj faras longan kampanjon, eble oni sukcesos. Demokratie oni devus aŭskulti, analizi, esprimi kaj reformi Esperanton. Kiam oni solvos ĉi-problemon, ni estos pretaj por reformi Esperanton. Nuntempe se oni ne konsentas pri kelkaj vidpunktoj aŭ reformoj, ni multe batalas kontraŭ ili. Oni devas ankaŭ forigi la batalon inter ni pri la reformoj de Esperanto. Diskutu, analizu, ne batalu.

Fine, mi konscias ke Esperanto estas ĉiam plena de esperoj por la nuna mondo, por la pacmondo. Reformu Esperanton, sed ne detruu ĝin.

**Mario L. Ruiz Karell**

## oficiala tutmonda pont-lingvo

post legado de *Nova Provo*, sainas ĉe por multaj ĝentoj ne eblas prononci tutiun 28-sonan de zamenhofa alfabeto. do se oni volas gardi po unu sonon en litero, ĉi konsenti kun s-ro Hussain M. Al-Amiry, pri *avantago* de sama signo por mana ĉi meznisa skribo, estas tute nova kreado ĉion oni devas entrepreni.

tio implikas samtempe modifi lortaron, alfabeton, ĉi fundamenton. neĉ Novo neĉ akademio de esperanto sufisas por aprobiqi de tutmonda popolo tiun egan reformon; qi preterpasas esperantan movadon ĉi postulas mastrecon de oficiala tutmonda instanso.

fakte, endas ĉrei tute novan radikonon kun pli da fonemoj ĉster ocsidentaj lingvoj, presipe ĉa sono R delus esti en nenia lorto de nova pont-lingvo.

bonvolu trovi sube, scison de alfabeto kun nur 17 sonoj ĉi signoj, ĉies literoj estas fasitaj por manskribado ĉi presado.

1	α	a	A...*	
2	β	b	B v V... (b+v→v)	
3	s	s	S c C ĉ, ts...	
4	d	d	D t T	
5	ε	e	E...	
6	f	f	F	
7	q	g	G ĝ, ĵ...	
8	l	l	L r R (l+r→r)	
9	i	i	I...	
10	ə	j	J y Y (signo de plurato)	
11	ɔ	k	K...	
12	m	m	M	
13	n	n	N	
14	o	o	O...	
15	p	p	P...	
16	t	t	T...	
17	u	u	U...	

antaŭ aserti ĉe tio estas utopio oni delu almenaŭ demandi al:

lingvistoj:

- ĉiom da konsceptoj nesecaj al fasita komunizado?
- ĉiel miĉi ilin?
- ĉia sintakso?

\* La kompleta aŭtora listo de reprezentataj literoj, kiu inkluzivas diversajn diakritajn variaĵojn ktp, ne estas redonata tie ĉi. —Red.

fonetistoj:

- ĉiom da sonoj al musika ĉa metodo lingvo?

matematikistoj:

- ĉiom da signoj nesecaj al solvado de ĉa enigmo?
- ĉiom da nukleaj elementoj?

signistoj:

- ĉia alfabeto?
- ĉia signa desegno?

komputilistoj:

el tutmonda lingvo usante ĉa selektan metodon IF "... " THEN "... " ELSE "... "

- ĉiel doni al istoj novan elementon al solvanta studado.

eksempla: se "antaŭposicio" al, da, el, ĉe konvenas, sed modifendas per, pri, pro, por, eble pri devenos *tem? alaut?*

per	ite? jun?
pro	ĉaus? tie? ĉe?
por	to? aim? af?

sed tio estos aĉo de lingvistoj usante potenson de komput-masinoj. neniu povas sofa peneqi al tia ĉa tasoo. ĉen elventuala programo al Novo?

Pierre Estève (Francio)

## Ni finu jam la alfabeton

En la E-alfabeto estas 28 sonoj kay en la latina estas nur 26 literoj. Se ni volas konservi la gravan regulon "Unu litero unu sono, unu sono unu litero", ni devas forigi du sonojn. La sonoj de la literoj ĝ, ĵ kay z estas tiel similaj ke estas malfacile distingiti inter ili. Do, se ni forigas la sonojn ĵ kay z, kiuj ne estas utilaj, ni havas 26 sonojn. Ni faros jen:

	ĉ								ĝ					
a	b	c	d	e	f	g	h	i	j	k	l	m		
n	o	p	q	r	s	t	y	v	w	x	y	z		
									ŭ	ŝ	j	c		

La du zentraj linioj reprezentas literojn, kay la supraj kay subaj linioj reprezentas sonojn. En normala parolado estas preskav la sama prononzo. La skriba aspekto nepre devas xanji ion, kay ni devas akcepti tiun, kiu estas nek pli bela, nek pli malbela, nur nekutima; ne eblas xanji entute 10 literojn kay ke la aspekto estu la sama, tio estas qimero. Ni devas fini jam la alfabeton por povi iri al aliaj temoj.

Juan Navareño

*EPS: Esperanto-Pligrandigo por Sciencoj*

EPS = Esperanto-Pligrandigo por Sciencoj: tio estas sistema pligrandigo aŭ pligrandiga sistemo ekster Esperanto, apud Esperanto, sed por Esperanto. La aŭtoro rimarkis, ke ekzistas pluraj projektoj kaj ideoj ŝanĝi la Fundamentan abocon de la Internacia. Li opinias la Fundamentan abocon taŭga, sed same toleras certajn argumentojn de nova aŭ apuda aboco rilate la literojn *j, y, w* kaj *ĥ*. Pripensinda argumento estas havi abocon enhavantan ĉiujn Romiajn literojn. Sed li forte kontraŭas eljeti la ĉapelitajn literojn: plej bona solvo por la sono *ŝ* estas kaj restas *s* kun supersigno (anstataŭigebla per *sh*).

En kemia kaj matematika terminaroj, la aŭtoro spertis la neceson havi nombrononj komenciĝantan per *b* por 2, per *p* por 5, per *h* por 6 kaj per *e* por 9. Ni notu, ke la Akademio de Esperanto jam permesis la kromformon *un'* por 1 certakaze (*Aktoj de la Akademio II*, p. 39); *nul* apartenas al la 8a Oficiala Aldono; tion ĉi EPS kompreneble transprenas.

Estu ankoraŭfoje substrekite kaj akcentite, ke EPS ne estas laŭ-Fundamenta Esperanto sed nur kromaĵo, apudaĵo. Ĝi estas kompromiso por eviti i.a.

- ŝanĝi la Fundamentan literaron, ekzemple enkonduki la literon *w* pretendante, ke per tio temas ankoraŭ pri Fundamenta Esperanto;
- enkonduki tute novan nombrosistemon;
- anstataŭigi *-aŭ* per *-e*;
- enkonduki abocon kun ekzemple *jj* (*ĵ*), *xz* (*kz*), *qu* (*kv*);
- tute forigi la sonon kaj literon *ĥ*.

La EPS-nombro trovas aplikon ekzemple kemiaj kaj matematike: la sistemo NUBTQPHSOE por la nomoj de kemiaj elementoj kun atomnumero pli granda ol 99, matematikaj terminoj kiel *heksgono*, *pemtongo*, *binaria*, *unaria* aŭ *dekheksaria*.

I. EPS-LITERARO

aA bB cC ĉĈ dD eE fF gG hH iI jJ kK kĤ lL mM  
a b c ĉ d e f g h i ĝ k ĥ l m  
nN oO pP qQ rR sS ŝŜ tT uU vV wW xX yY zZ žŽ  
n o p kv r s ŝ t u v ŭ ks j z ĵ

Rimarkoj:

a) Eblas  $\hat{c} = ch$ ,  $\hat{k} = kh$ ,  $\hat{s} = sh$ ,  $\hat{z} = zh$ . Anstataŭ  $\hat{}$  eblas alia sed por ĉiuj kvar literoj sama distingita signo, ekz.  $\hat{c}$ ,  $\hat{k}$ ,  $\hat{s}$ ,  $\hat{z}$  aŭ  $\hat{c}$ ,  $\hat{k}$ ,  $\hat{s}$ ,  $\hat{z}$  aŭ  $\hat{c}$ ,  $\hat{k}$ ,  $\hat{s}$ ,  $\hat{z}$  aŭ  $\hat{c}$ ,  $\hat{k}$ ,  $\hat{s}$ ,  $\hat{z}$  ktp.

b) Ĉiu litero rajtas stari en ĉiu ajn pozicio.

Do permesita estas vortkomenca *w* (ŭ): *wato*, *westo*, *Wagadugo*.

c) Oni decidu, ĉu *j* estu anstataŭebla per *dž*. Ekz. *budžeto* = *bujeto*, *edžo* = *ejo*, *džardeno* = *jardeno*, *džangalo* = *jangalo*, *džis* = *jis*. Oni decidu, ĉu eblu paralele uzi *ĵ*, *ĥ*, *ĝ* kaj *ŝ*.

ĉ)  $kv = q$  kaj  $ks = x$  nur en radikoj. Ekz. *externa*, *axo*, *experti*, *experto*, *xenono* sed *deksep*, *eksperti*.

Ekz. *seĝi*, *aqo*, *se ĝin beroy...*, *qadrato*, *qankam*, *qar*, *ĝin* sed *seĝinberoy*, *ekvarmiĝi*.

X anstataŭas nur *ks*, sed neniel *kz*. Ekz. *dextra*, *lexikono*, *oxigeno*, *experimento* sed *ekzemplo*, *makzelo*.

d) La disigoj *kv/q* kaj *ks/x* priskribitaj en ĉi) ekzistas ankaŭ same de *ts/c*, *tŝ/ĉ* kaj *dŝ/ĝ*: *cences* (ne: *cences*), *frajtsiĝo* (ne: *frajĉiĝo*), *ardĝaluza* (ne: *argaluza*). Same: *deksep* (ne: *dexep*), *seĝinbero* (ne: *seĝinbero*).

e) Y anstataŭas *j* ĉie ĉiel: *ya*, *yu*, *yesi*, *yuna*, *yunay*, *yunulo*, *yunuloy*, *yunuloyn*, *kayo*, *joyo*, *geya*, *boyi*, *braynoyn*, *ayn*, *ĉiuy*, *miayn*, *boykoti*, *tuy*, *domyo*, *kay*, *granday*, *lerneyo*, *lerney'*, *tiay*, *pley*, *triyara*.

f) Malpermesite estas anstataŭigi *w* per *u*, *y* per *i*, *i* per *y* kaj *k* per *q*.

g) Atentu la simetriojn: *z/s* kaj *ž/ŝ*, *dz/c* kaj (*dž* =) *j/ĉ*.

II. EPS-NOMBRARO

a)	<i>mll</i>	<i>cifero</i>	<i>EPS</i>
	N	0	nul
	U	1	unu aŭ <u>un</u>
	B	2	du aŭ <u>bin</u> (laŭ PIV-aj <u>bin</u> ara k <u>bin</u> oklo)
	T	3	tri
	Q	4	kvar (= qar) (maltaŭgas <i>tetr</i> )
	P	5	kvin (= ĝin) aŭ <u>pemt</u> (ŝanĝo n→m laŭ modelo <i>kiam</i> )
	H	6	ses aŭ <u>heks</u> (= <u>hex</u> ) (laŭ ekzemple PIV-a <u>heks</u> odo)
	S	7	sep (maltaŭgas <i>hept</i> )
	O	8	ok
	E	9	naŭ (= naw) aŭ <u>enaŭ</u> (= <u>enaw</u> )

La substrekitajn formojn oni prefere uzu ne por nombroj sed nur por la element-nomoj kemiaj (*Unn Unnulnulo*, *Unu Unnulunio*, *Unb Unnulbinio*, *Unt Unnultriio*, *Unq Unnulqario*, *Unp Unnulpemtio*, *Unh Unnulhexio* ktp) kaj certaj matematikaĵoj je *-angulo*, *-gono*, *-edro*, *-latero*, *-aria* k.s. Alia ekzemplo estas la evitinda "bifadena" = *dufadena*, *binfadena*. Same

“biliono” = *duliono, biniliono*; “bimetala” = *dumetala, binmetala* ktp.

b) La dek-kvin ciferoj de la dekdesaria nombrosistemo kutime estas 1 2 3 4 5 6 7 8 9 A B C D E F. Por eviti konfuzon kaj por havi verajn nomojn por la lastaj ses ciferoj, oni povas formi ilin per -s je la ciferoj nul ĝis kvin; do: *unu du tri kvar kvin ses sep ok naŭ nuls unus dus tris kvars kvins*. Ankaŭ eblas *uns* anstataŭ *unus*.

Etimologio de -s: la Franca, Portugala, Hispana, Itala kaj Rumana lingvoj; maltaŭgaj estas kaj -z kaj -c kaj -k kaj -ĉ.

c) Komparu la PIV-ajn -t/ (p. 1077) kaj -tet/ (p. 1105) por la muziko.

### III. EPS-KALENDARO

(Komparu: *La Let. de l'AdE*, n-ro 5, p. 6.)

#### a) LA SEMAJN-TAGOJ

<i>Esperanto</i>	<i>EPS</i>	<i>religiaj kromnomoj</i>
lundo	dudo	
mardo	trido	
merkredo	kvarido	
ĵaŭdo	kvindo	
vendredo	sesdo	alĝumo
sabato	sepdo	ŝabato
dimanĉo	unudo	dimanĉo aŭ
	aŭ undo	domingo aŭ domengo

Tio ĉi estas la Portugala-Greka sistemo (ekz. *trido* = *têrca-feira* = *Tri'ti*); komparu ankaŭ : Arabaj *sabaa* (= sep) kaj *al-sabt* (= sabato). Alia sistemo, nome *lundo* = *undo* ĝis *dimanĉo* = *sepdo*, nur trovas apogon en la Slavaj kaj Hungara Lingvoj kaze de *ĵaŭdo* kaj *vendredo* (ekz. *csütörtöl/péntek* kaj *čtvrtek/pátek*). Krome, *undo* memorigas al *lundo*.

#### b) LA MONATOJ

Dum la semajn-tagoj finiĝas je -do, la monatoj EPSe finiĝas je -embo. La liter-triopo *emb* estas pli facile elparolebla ol *embr* kaj ne konfuzebila kun *embri*; plie endas klara distingo inter *septembro* ≠ *sepembo* kaj *decembro* ≠ *dekembo*. Por eviti konfuzon rilate la parojn *unuembo/dekunuembo* kaj *duembo/dekduembo*, EPS proponas alternativojn. Jen la dek-du monatoj: *unuembo, duembo, triembo, kvarembo, kvin-embo, sesembo, sepembo, okembo, naŭembo, dekembo, dekunuembo* aŭ *antaŭlastembo, dekduembo* aŭ *finembo*. (Anstataŭ -embo, ankaŭ penseblas -ato, -mo aŭ -uaro.)

Claus Günkel (Germanio)

## La Gramatiketo det Internaciezo

La alfabeto det internaciezo havas 27 literojn. La litero *ĥ* ne ekzistas. Anstataŭ *ĉ* kaj *ŝ* oni darfas skribi *cx* kaj *sx*. Anstataŭ *ĝ* kaj *y* oni darfas skribi *aw gx* kaj *ix* aw *q* kaj *y*. Anstataŭ *ŭ* oni darfas skribi *w*. La esperantan *ĥ* oni povas skribi jene: *hx*.

1) (15) Vortoj estas prenataj de 1) PIVo; 2) ĉiuj esperantaj-naciaj kaj naciaj-esperantaj vortaroj; 3) la libro *Ĉiu-tagaj Vortoj kun Difinoj kaj Mankantaj Neologismoj kun Difinoj*; 4) vortoj kreotaj fa neolog(ismemul)oj. 2) (9) Same kiel E. 3) (10) Same kiel E. 4) (2) Substantivoj havas la finayon *o*. Kazoj ekzistas du (2), nominativo kaj prepozitivo. Prep. *des* montras genitivan. Prep. *de* montras ablativan. Prep. *an* aw finayo -*n* montras an akuzativon. Prep. *pri* montras an traktativon. Prep. *al* montras an dativon. Prep. *per* montras an instrumentalon. Internaciezo havas pli da prepozicioj ol E. 5) (16) Same kiel E. 6) (5) Same kiel E. 7) (3) Same kiel E. 8) (1) Same kiel E. 9) (4) Same kiel E. 10) (7) Same kiel E. 11) (12) Same kiel E. 12) (6) La prepozicio det pasivo estas *fa*. 13) (8) La prepozicioj faras prepozitivon. 14) (13) La prepozicio *an* kaj finayo -*n* povas montri direkton kun eniro en internon. 15) (14) Same kiel E. 16) (11) La vortoj kunmetitaj devenas de suplemento aw prepozitivo. 17) Oni uzos *mal-vorto-anstatawayojn* el tuta PAGo, precipe para. 420, p. 507 kaj 508; kaj el ĉiuj aliaj vortaroj. 18) Plibonigo estas ebla en internaciezo. 19) PAGo estas ankaw por internaciezonoj, sed oni enmetos neologismojn por plibonigo an E.

Richard Stahl

## Korelativoy

La Esperantaj korelativoy estas ege utilaj sed oni devas agnoski, ke en ili troviĝas amaso da esceptoj kontraŭ la reguloj de la lingvo. Ni havas adyektivoy kiuj ne finiĝas per -a, substantivoy sen -o, adverbojn sen -e kaj demandojn sen *ĉu*. La *ki*- serio estas yen rilata yen demanda (tio estas malfacilajo en la uzo de Normala Esperanto en komputila tradukado) kaj, almenaw por ewropanoy, multaj el la vortoj lezas la naturan aperon de la lingvo.

Kiam oni provas etendigi la sistemon (natura procedo) oni trovas aliajn problemoy. Kelkaj verkistoy yam uzis formoy kiel *aliel* aw *aliu*. Tio estas komprenebla, sed kiu raytas diri A raytas diri B. Kion signifus *alie*? Cu “aliloke”,

cu “alimaniere”? Cu *alia* signifas “alispeca” aw nur “malsama”?

Yen proponata solvo.

Unue ni konsideru la unuan kolonon:

io  
kio  
tio  
omnio (anstataw *ĉio*)  
alio

Tioy estas ordinaray substantivoy obeantay la ordinaray regulojn de Esperanto; antaw ili oni povas uzi prefiksojn aw prepozitsiojn tute ordinare se la senco permesas aw postulas. Do klare oni havas no *ĉitio* (*ci* estante prefikso en Rodosa Esperanto [la eksperimenta formo de la aŭtoro—*Red.*]), *nenio* (*nen* estante alia formo de *ne*), *tiulo*, *neniulo* k.t.p.

Sekvas el la ordinaray reguloj de Esperanto, ke oni nur deprenu la finaĵon for de la radikoj kay aldonu *-a* aw *-e* por trovi adjektivon aw adverbon, kay oni havas la serion:

io	ia	ie
kio	kia	kie
tio	tia	tie
omnio	omnia	omnie
alio	alia	alie

Notu tamen, ke demando bezonas la vorton *cu*. Sen *cu* la *ki*-serio estas rilata, ne demanda. En Normala Esperanto oni uzas *Ĉu* nur por demando al kiu oni povas (teorie) respondi (respondi) per “jes” aw “ne”. En Rodosa Esperanto tiu komplikajo nen estas netsesa. Oni uzu *cu* por ayna demando. Ji funkcias same kiel la demandosigno (precipe en la hispana lingvo) aw kiel la frazfina *ka* en la japana, kiu uzas similajn korelativajn: “Cu kio estas tio?”

Kompreneble pleyofte la signifo de la cisupray korelativoy nen estas kompleta. Do ni agu en la kutima Esperanta maniero kay uzu afiksojn.

Aldonu la individuigan afikson *-w-* al la unuay du kolonoy kay vi havas:

iwo	iwa
kiwo	kiwa
tiwo	tiwa
omniwo	omniwa
aliwo	aliwa

“Cu kiwo estas sur la tablo?” “La libro kiwan mi metis sur la tablon.”

Por personoy oni povas aldoni personigajn afiksojn: “Cu kiulo (kilio) estas li?” “Cu kiuno estas ŝi?” “Tiulo estas la vir(ul)o, kiulon (kilion) vi vidis hieraw.”

Por indiki apartenon ekzistas kompreneble la sufikso *-es-*: *iesea*, *cu kiesa*, *ĉitiesa* k.t.p.

Se oni deziras montri ke adyektivo temas pri speco kay ne montras individuigan funktsion, uzu, lawlogike, no *-ets-*: “Cu kietsa frukto estas pomo? Ji estas dolca.” (Anstataw “Kia frukto estas pomo? Ĝi estas dolĉa.”)

*Tamen, uzante la principon de netseso kay sufico, oni povas ellasi ian sufikson se la signifo estas suffice klara sen tio.*

La adverbaj korelativoy kutime bezonas sufiksojn.

Kiam temas pri loko, uzu no *-b-*:

ibe, nenibe  
kibe, cu kibe  
tibe, citibe  
omnibe  
alibe

*-el-* montras manieron:

iele, neniele  
kiele, cu kiele  
tiele, citiele  
omniele  
aliele

Simile por kvanto ni uzu *-ent-* (pli internatsia ol *-om*):

iente, neniente  
kiente, cu kiente  
tiente, citiente  
omniente  
aliente

Kompreneble por rezono ni uzu no *-al-*:

iale, neniale  
kiale, cu kiale  
tiale, citiale  
omniale  
aliale

*-and-* montras tempon:

iance, neniande  
kiande, cu kiande  
tiande, citiande  
omniande  
aliande

Adverbaj povas iji substantivoy k.t.p. kiele kutime (ekz. *kialo*), kaj se netsese oni povas uzi pli ol unu sufikson (ekz. *tiandele*).

Sendube la tuta tabelo aspektus granda kay komplika *sed ne netesesu lerni ĵin*: suficus nur lerni no *kvin* vortoy *io*, *kio*, *tio*, *omnio*, *alio* kay kelkajn afiksojn, kay ni havus pli logikan, pli internatsian kay (pley grave) *pli Esperantan* sistemon.

S. R. Dalton (Britio)